

## **IRU KAJ FARU ANKAŬ VI LA SAMON**

– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

*Lk 10,25-37*

En tiu tempo, iu leĝisto stariĝis por tenti Jesuon: «Majstro, kion mi faru por heredi eternan vivon? ». Jesuo diris al li: « Kio estas skribita en la Leĝo? Kion vi legas en ĝi? ».

Tiu respondis: «Amu la Eternulonon, vian Dion, per via tuta koro, per via tuta animo, per via tuta forto kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem». Kaj Jesuo: « Vi prave respondis; faru tion kaj vi vivos». Sed tiu, volante sin pravigi,diris al Jesuo: «Kaj kiu estas mia proksimulo? ».

Jesuo pluiris: «Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo kaj trafis en rabistojn, kiuj lin senvestigis, lin batis kaj poste foriris, lin lasante duone senviva. Laŭ okazo, unu pastro malsupreniris laŭ la sama vojo kaj kiam lin vidis, li preterpasis. Ankaŭ iu levido, tien alventinte, lin vidis kaj preterpasis. Male unu Samariano, kiu estis vojaĝanta, pasante apud li, lin vidis kaj kortuŝiĝis.

Alproksimiĝis al li, bandaĝis liajn vundojn, surverŝante oelon kaj vinon; poste, lin metinte sur sian ŝarĝobeston, lin kondukis al gastejo kaj lin prizorgis. La postan tagon, li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, dirante: Zorgu pri li, kaj kion vi plie elspezos, mi tion repagos al vi ĉe mia reveno. Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu kiu trafis en la rabistojn?». Tiu respondis: «Tiu, kiu lin kompatis». Jesuo diris al li: « Iru vi, kaj faru tion saman».

Jesuo ŝanĝis radikale la koncepton “proksimulo”. Proksimulo, en la hebrea mondo, estis tiu kiu estis objekto de amo. Kaj jen por Jesuo, proksimulo estas tiu kiu amas, do proksimulo ne estas tiu al kiu mi adresas mian amon, sed estas mi. Do ne tiu kiu estas amata, sed tiu kiu amas.

Kaj la evangeliisto Luko tion prezentas en la tre konata kaj tre amata parabolo de la Samariano. Ni ĝin vidu: “Unu leĝisto” nome iu fakulo, en la aliaj evangelioj ili estas nomataj skribistoj, ili estas la oficialaj teologoj pri la instruado de Izraelo. “stariĝis por...” ne estas por lin elprovi sed “por tenti Jesuon”. La verbo estas la sama kiun la evangeliisto utiligis por la tentoj de Jesuo fare de la diablo en la dezerto.

Do la granda defendanto de la leĝo, efektive, por la evangeliisto, estas nenio alia ol diabla instrumento.

Kaj li demandas al li: “«Majstro»”, jen la tipa falseco de la religiaj personoj, li ne volas eklerni, li volas kondamni, volas meti kaptilon al Jesuo. Kaj li demandas kion li devas fari por havi la eternan vivon. Jesuo respondas al li tre flegme, tre hironie. Ni supozu ke tiu persono estas iu kiu dediĉis sian tutan ekzistadon al la kono, al la legado kaj interpretado de la sankta skribo. Kaj li demandas: “«Kio estas skribita en la leĝaro?»” kaj poste, des pli notinde “«Kion vi legas en ĝi? »”, nome kion vi komprenas?

Ĉar ne sufiĉas legi la Bibliion, oni devas ĝin kompreni. Se oni ne metas kiel unua valoron la bonon de la homo, la Biblio povas esti legata, relegata, predikata, anoncata, sed oni ne ĝin komprenos. La leĝisto respondas per tio kio estis la kredo de Izraelo, elprenita el la libro de Readmono, ĉapitro 6, kaj al tio li aldonas la ordonon de la libro pri Levidoj. Do al la amo al Dio per sia tuta animo, absoluta amo, la amo al la proksimulo kiu estas relativa... “«kiel vin mem»”.

Kaj Jesuo diras: “«Vi prave respondis, faru tion kaj vi vivos. Sed tiu, volante sin pravigi...»”. Kial sin pravigi? En la tempoj de Jesuo estis granda debato inter la rabenaj skoloj pri kiu estas la proksimulo. Oni iris de la plej strikta koncepto, “la proksimulo estas nur tiu kiu apartenas al mia familia klano aŭ al mia tribo”, ĝis tiu plej larĝa, kiu enmetas en la proksimulon ankaŭ la fremdulon kiu loĝadis ene de la Izraelaj limoj.

Do la fakto ke li volas sin pravigi signifas ke tiu leĝisto emas al pli strikta interpreto. Kaj jen la mirinda parabolo de Jesuo. “«Unu homo malsuprenis de Jerusalemo al Jeriĥo»”, de 800 kaj pli da metroj super la marnivelo, Jeriĥo estas je 258 metroj sub la marnivelo, en malmultaj kilometroj, temas pri irado malfacila, malkomforta kaj pri danĝera loko.

La homo falas en la manojn de la rabistoj kiuj lin lasis mortonta. Sur tiu vojo, en tiuj kondiĉoj, la morto estas certa, escepte se pasus tie hazarde iu. Fakte, bonŝance, - tio kio ĉi tie estas tradukita per ‘laŭ okazo’ signifas bonŝance, kaj Jesuo pliigas la atenton de siaj askultantoj - “«lu pastro malsuprenis»”, gravas la indiko ke li malsupreniradis. Jerusalemo estis la urbo kie estis la templo kaj Jeriĥo pastra urbo.

La pastroj supreniradis al Jerusalemo por ekservi ĉe la templo kaj dum unu semajno ili devis esti tute puraj por ofici antaŭ la Sinjoro, do ni ne havas ĉi tie iun pastron kiu supreniras al Jerusalemo, sed kiu malsupreniras. Li estis en kontakto kun la Sinjoro dum unu semajno. Li estas plene pura: plej bone ne povintus okazi.

“«Li malsupreniris laŭ tiu sama vojo kaj kiam li vidis lin...»”, la savo proksimas. Kaj jen la malvarma duŝo, “«Li preterpasis»”. Kial? Ĉu li ne estas sentema? Ĉu li estas malhomeca? Ne, plimalbone, li estas religiulo, kaj laŭ lia religio, lia leĝo, la libro de Levidoj kaj de Nombroj malpermesadis al li tuŝi mortinton. Al li, kiu estis pastro, tiuj malpermesis tuŝi eĉ la kadavron de propraj gepatroj.

Tio kion Jesuo metas en diskuton estas tre serioza afero. Ĉu oni devas observi la leĝon ankaŭ kiam tio kazas suferojn al la homoj? Kiam estas konflikto inter la dia leĝo kaj la homa bono, kio farendas? La pastro ne havas dubojn: unue venas la dia leĝo kaj poste la homa bono. Same iu Levido, nome la kulto-prizorgantoj.

Do, por la homo, malbonŝanculo, ne plu estas ajna espero. Ne nur estas neniu espero, sed kio okazas? “«Iu Samariano, kiu vojaĝadis, pasante apud li lin vidis»”. La Samarianoj estis malamikoj de la Judoj. Ĉiun fojon kiam ili renkontiĝis ekestis kverelo kaj kiel rezulto iu mortis. Ĉi tie, imagu, estas iu Samariano kiu vidas unu malamikon duonmortonta, kion li faros? Li tiun finmortigos.

“«Li lin vidis»”, kaj jen, sensacie, “«li kortuŝiĝis, sentis kompaton»”. La verbo ‘kompati’ estas teknika verbo kiu indikas iun dian agon per kiu la Sinjoro redonas la vivon al tiu kiu ne ĝin havas. Oni distingas inter ‘kompati’, dia agado, kaj ‘senti mizerikordon’, homa agado.

Kompati en tiu Evangelio aperas tri fojojn, kiam Jesuo vidas la mortintan filon de la vidvino de Nain, lin kompatis kaj lin revivigas, kiam la Patro de la erarinta filo vidas la filon li tiun kompatas kaj redonas al li la vivon. Kaj jen, la ununura rolanto al kiu oni atribuas dian faron, estas ĝuste tiu konsiderata la plej malproksima de Dio, malamiko de Dio, rivalulo de Dio.

Jesuo estas respondanta al la demando: “kiu estas la kredanto?” Ĉu li estas tiu kiu obeadas al Dio observante liajn leĝojn aŭ tiu kiu similas al la Patro praktikante iun amon similan al la lia? La respondo estas tre klara.

“«Lin vidis. Alproksimiĝis al li»”, lin prizorgadas en maniero eĉ troa, li iĝas servanto de tiu homo. Kaj jen la fina demando de Jesuo al la leĝisto. “«Kiu el tiuj tri»” – do ni havas pastron, levidon kaj Samarianon – “«ŝajnas al vi esti la proksimulo? »”.

Li estis demandinta “Kiu estas mia proksimulo?”. Male Jesuo demandas al li “kiu estis la proksimulo”. Ne ĝis kie devas alveni via amo, la proksimulo, sed de kie devas starti via amo. Mi do memorigas ke la proksimulo ne estas tiu kiu estas amata, sed tiu kiu amas. “«Kiu estis la proksimulo de tiu kiu falis»”.

Kia povas esti la respondo? La Samariano, sed la leĝisto evitas eldiri la hororan nomon de malamiko, do li diras: «Tiu...», li ne akceptas diri “tiu kiu havis kompaton”, kaj bedaŭrindas vidi ĉi tie la tradukon kiu tradukas tiel, la greka verbo estas malsama, sed li diras “kiu havis mizerikordon”. Fakte li, la kulthomo, ne toleras – estas por li neakceptebla – ke la homo povus konduki kiel Dio.

Kaj jen Jesuo diras al li: “«Iru kaj faru ankaŭ vi la samon»”.